

Basyoo

Vojaĝo preta al veterbata skeleto

(Tradukis el japana lingvo Teruhiro Sasaki)

Ekirante en la vojon de mil leŭgoj, mi ne portas mangoprovizon, kvazaŭ eniras en nenion sub la noktmeza luno. Apogante min je la bastono de antikvuloj, mi eliris el surborda domaĉeto aŭtune en la oka monato de unua jaro de Zyookyoo [1684], kiam vento sonoras ial malvarme.

En koro mi estas preta
Je la sorto de skeleto forlasota,
Nun tra korpo penetras vento

[Nozarasi wo kokoro ni kaze no simu mi kana]

Aŭtuno, pasis dek jaroj,
Nun ĉefurbo Edo fariĝis jam
Mia malnova hejmo

[Aki totose kaette Edo wo sasu kokyoo]

En la tago, kiam mi trapasis la Barrieron de Hakone, pluvis kaj ĉiuj montoj kaŝiĝis en nuboj.

Nebulas, pluvas malvarmete,
Tago, kiam ne videblas monto Huzi,
Ankaŭ estas fascina

[Kiri sigure Huzi wo minu hi zo omosiroki]

Iu homo, nomata Tiri, helpas al mi ĉi-foje en la vojaĝo, elkore zorgante pri ĉio. Ĉiam ni tre bone akordiĝas unu kun alia, do li estas vere kredebla amiko. Tiri versis:

Hukagawa –
Lasante monton Huzi zorgi
Bananujon, ni foriris.

[El Hukagawa,
Al Huzi prikli Baŝoo-bananujon
Mi iras]

[Hukagawa ya Basyoo wo Huzi ni azuke yuku]

Kiam mi iris apud la rivero Huzigawa, mi trovis unu bebon ege ploranta, kiu, verŝajne, estas ĉ. tria jaraĝa kaj forlasita. Lia gepatroj ne povas elteni ondon de la mondo, kiel torenton de ĉi rivero. Lia vivo, kvazaŭ roso, daŭrus efemera, do ili, ŝajne, forlasis lin. Blovas aŭtuna vento ĉe la eta floro de lespedezo, kiu falus ĉi nokte aŭ velkus morgaŭ. Mi preterpasis lin, ĵetinte al li pecon de manĝaĵo el mia maniko.

Aŭskultanto simion ploranta!
Al forlasita bebo
Kia aŭtuna vento?

[Saru wo kiku hito sutego ni aki no kaze ikani]

Kio okazis al ci? Ci estas malamita de patro? Aŭ malzorgita de patrino? Cia patro ne malamas cin kaj patrino ne malzorgas cin. Tio ĉi estas nur ĉiela ordono. Ploru pri cia denaska malbona sorto.

En la tago, kiam ni trairis trans la rivero Ooigawa, pluvis tutan tagon. S-ro Tiri versis.

Pluvas en la aŭtuna tago ĉe la Ooigawa,
Oni, ŝajne, kalkulas per fingroj nian stadion
En ĉefurbo Edo

[Aki no hi no ame Edo ni yubi oran Ooigawa]

Mia verso sur la ĉevalo,

Ĉe la vojo
Hibisko, kiu vane
Estas manĝita de ĉevalo

[Miti no be no mukuge wa uma ni kuware keru]

Videblas apenaŭ la luno de dudeka tago, estas mallume apud montpiedo. Tiam mi

veturas ĉevale kun vipo pendata sur ĝia dorso, iras kelke da leŭgoj, tamen ankoraŭ ne krias koko. Tio rememoras ĉinan poezion de Dumu pri duondormeto dum frua irado per ĉevalo. Atinginte krutan vojon de Sayononakayama, subite mi vekigis surprizite.

Surĉevale somnolas,
Restas duondormeta songo,
Luno malproksima,
Fumo de teo

[Uma ni nete zanmu tuki toosi tya no keburu]

Mi vizitis s-ron Matugaya Huubaku, kiu loĝas en Ise, tie mi restis dum ĉ. 10 tagoj. Mi estas tute sen armilo. Mi portas kvestosakon ĉe mi de sur kolumo, kaj havas rozarion el 18 grajnoj en mia mano. Mi similas al bonzo, sed ankoraŭ portas mondan polvon. Mi estas simila al laiko, sed sen haroj. Mi ankoraŭ ne estas bonzo, sed estas sama kiel kvestulo- Budhista. Tial do mi ne permesas al mi eniri antaŭ la altaron de ŝintoismo.

Vespere post la krepusko mi adorvizitis la eksteran sanktejon. Ĉirkaŭ la unua torijopordo estis iom mallume, videblas lanternaj lumoj tie kaj ĉi tie. Plej supra vento el pinarbaro sur montopinto trapikis min, elvokis en mi profundan senton, do mi versis.

Monata fino, sen luno,
Miljaraĝan kriptomerion brakumas
Blovego

[Misoka tuki nasi titose no sugi wo daku arasi]

Ĉe la piedo de valo, nomata Saigyo, fluas la rivereto. Virinoj tie lavas kolokasiojn. Vidante tion mi versis.

Kolokasiojn lavas virinoj,
Se tion vidus Saigyo,
Li nepre versus poezion

[Imo arau onna saigyo naraba uta yomamu]

Ĉi tage sur revena vojo mi eniris en unu teejon, do virino, nomiĝanta Tyoo [Papilio], diris al mi ke mi versu, uzante ŝian nomon, kaj ŝi prezentis blankan silkaĵon. Mi skribis en ĝi.

Bonodoro de orkideo,

Flugilojn de papilio

Parfumas

[Ran no ka ya tyoo no tubasa ni takimono su]

Mi vizitis pajlan ĥaton de liberulo.

Hedero plantita,

Ankaŭ kelke da bambuoj,

Skuas ilin tempesto

[Tuta uete take si go hon no arasi kana]

Mi revenis hejmen al naskiĝloko je la komenco de naŭa monato. Forvelkis pro prujno kaj nun tute ne restas la taglilio, plantita apud norda halo, kie loĝis patrino. Ĉio ŝanĝiĝis de antaŭo, flankaj hartufoj de miaj gefratoj blankiĝis kaj ĉe la brovoj sulkiĝis. Ni nur diris: “Estu vivaj”. Kaj ne povis diri plu. Frato elpakis saketon de amuleto kaj diris: “Rigardu blankharojn de panjo! Ĉe vi ankaŭ maljunuliĝis brovoj, kiel la epizodo de Urasima, kiu malfermis pandoran skatolon kaj tuj maljunuliĝis.” Ni ploradis dume-

Aŭtuna prujno,

Se mi prenis per manoj,

Ĝi malaperus,

Pro varmegaj larmoj

[Te ni toraba kien namida zo atuki aki no simo]

Ni piediris al la provinco Yamato [Nara]. Tie, en la distrikto Katuge [Katuragi], en Takenouti lokiĝas hejmo de s-ro Tiri, do mi ripozigis piedojn dum kelke da tagoj.

Kotonbatanta arko,

Muziko de liuto,

Koron konsolas,

En profunda bambuaro

[Wata yumi ya biwa ni nagusamu take no oku]

Mi adorvizitis la templon Taima-dera apud la piedo de la monto Hutakami. Mi vidis en la korto pinarbon, kiu, ŝainas al mi, havas mil jaraĝojn kaj estas tiel granda, ke ĝi povas kaŝi eĉ bovon. Kvankam ĝi estas sensenta, tamen, alligate kun Budhao, ĝi evitas sorton de tranĉo. Tio estas feliĉa kaj admirinda.

Bonzoj, kiel farbito,
mortadis unuj post la aliaj,
Vivas la sankta pinarbo
[Soo asagao iku sini kaeru nori no matu]

Mi, unu sola, vagis en la interno de Yosino. Jen montoj estas vere profundaj, blankaj nuboj amasiĝas sur la montpintoj, nebula pluvado pleniĝas en la valoj. Kabanetoj de hakistoj troviĝas tie kaj ĉi tie. Hakado en okcidento eĥiĝas en oriento, kaj sonoriloj de temploj sonas, penetrante en la fundo de mia koro. De malnova tempo multe da homoj, enirintaj en ĉi montoj kaj forlasintaj la mondon, fuĝis en ĉinajn poemojn kaj kaŝiĝis en japanaj versoj. Tio, ke oni komparas ĝin kun ĉina monto Lushan, estas tute prava, ĉu ne?

Kiam mi loĝis unu nokton en iu templa hospico, mi versis sekvan.

Maleu ŝtofon sur lignamboso,
Edzino en hospico,
Mi aŭskultu la sonon
[Kinuta utite ware ni kikase yo bou ga tuma]

Postsigno de la herba ermitejo de sankta Saigyō troviĝas dekstre ĉ. du cent metrojn for de la Interna Templo, tien kondukas nur la pado por kolektantoj de brulligno trans krutan valon – ĝi estas tre admirinda. Tiu fama purakvo, nomata Toku-toku, restas, ŝajne, same kiel antaŭe, kaj nun gutas kun ritmo Toku-toku.

Per gutoj – toku-toku
Mi volas forlavi min, koron,
Malpurigitan en efemera mondo.
[Tuyu toku toku kokoro mi ni ukiyo susugabaya]

Se Hakui [Boyi] estus en Japanio, li nepre purigus al si buŝon. Se oni infromus Kyoyuu[Xuyou], li lavus sin je oreloj.

Mi supreniris monton kaj descendis laŭ deklivo, tiam aŭtuna suno jam estis kliniĝanta, do preteriris kelke da famaj lokoj kaj adorvizitis antaŭ ĉio la maŭzoleon de Imperiestro Godaigo.

Pasis jaroj,

Kion rememoras davalioj,

Ĉe la maŭzoleo kreskantaj?

[Gobyō tosi hete sinobu wa nani wo sinobugusa]

El la provinco Yamato [Nara] pasinte tra la provinco Yamasiro, mi eniris en la vojo al Oumi-zi kaj atingis la provincon Mino. Post la stacioj Imasu kaj Yamanaka troviĝas la tombo de Tokiwa, kromvirino de Minamoto no Yosimoto. Moritake de Ise[1473-1549] iam versis: “Aŭtuna vento similas al s-ro Yosimoto”. Sed je kiu punkto la vento estas simila al li? Mi ankaŭ versis:

Al la koro de Yosimoto

Similas aŭtuna vento

[Yosimoto no kokoro ni nitari aki no kaze]

Apud la ruino de la bariero Huwa, kio signifas “nedetruibla bariero”.

Ho, aŭtuna vento,

Jen nur kaj vepro kaj kampo –

Sur la bariero Huwa

[Aki kaze ya yabu mo hatake mo Huwa no seki]

En la urbo Oogaki mi tranoktis ĉe s-ro Bokuin. Kiam mi eliris al vojaĝo el Musasino, mi en koro estis preta je morto, forlasote sur kampo, do nun mi versas:

Ne mortinte ankoraŭ,

Jen mi dormas fine dum vojaĝo,
En profunda aŭtuno
[Sini mo senu tabine no hate yo aki no kure]

Ĉe la templo Hontou-zi en la urbo Kuwana.

Vintraj peonioj,
Ĥaradrio estas egala
Al kukolo sur la neĝo
[Huyu botan tidori yo yuki no hototogisu]

Jam antaŭ aŭroro mi eliras al la plaĝo, saturite de dormado sur kuseno de herboj.

Ĉe aŭroro,
Salangiktido longa je unu colo
Ekbrilas blanke
[Akebono ya sirauo siroki koto issun]

Adorvizito al la sanktejo Atuta

Ege ruiniĝas la sankta teritorio, termuroj disfalis kovritaj de herbaroj. Tie kaj ĉi tie signoj de etaj sanktejoj estas ĉirkaŭitaj per ŝnuroj, kaj ene de ĉiu estas metita ŝtono, nomata kiu ajn Dio. Kreskas libere herboj kiel artemizio, davalio, k. a. Mi estas kortuŝita per tiu ĉi pli ol tre bontenataj sanktejoj.

Eĉ devalio velkis,
Aĉetis rizkukon
Ĉe la ripozejo
[Sinobu sae karete moti kau yadori kana]

Laŭ la vojo, eniranta en la urbon Nagoya, mi kantadis poeziojn.

Kantanta frenezajn poemojn,

Kiel frida vento, velkiganta foliojn,
Mi similas al Tikusai, vaganta poeto
[Kyouku kogarasi no mi wa Tikusai ni nitaru kana]

Kuŝinte sur herba kuseno dum vojaĝo,
mi aŭdas hundon nokte bojanta,
Pluvadas malvarme
[Kusa makura inu mo sigururu ka yoru no koe]

Piedirante vidi neĝon,

Civitanoj en bazaro!
Mi vendos ĉi tiun ombrelon,
Ombrelon de neĝo
[Iti bito yo kono kasa urou yuki no kasa]

Vidante vojaĝantojn,

Eĉ ĉevalojn
Mi spektas
En la neĝa mateno
[Uma wo sae nagamuru yuki no asita kana]

Ĉe marbordo tutan tagon pasigante,

Vesperigis sur maro,
Krio de sovaĝanasoj
Estas svage blanketa
[Umi kurete kamo no koe honokani sirosi]

Ĉi tiej mi demetadis pajlsandalojn, kaj tiej forĵetadis bastonojn, jam ĉi jaro finas en vojaĝo.

Finas jaro,
Mi iras kun ombrelo-ĉapelo

Kaj kun pajlsandaloj
[Tosi kurenu kasa kite warazi haki nagara]

Versante tiujn, mi pasigis novjaron en kabano de mia hejmo Iga.
Kies edzo estas tiu?
Kiu rondan moĉiparon kun filikoj
Transportas sur dorso de bovo
Al la gepatra domo de edzino
Je la novjaro de bovo
[Ta ga muko zo sida ni moti ou usi no tosi]

Laŭ la vojo al Nara.

Jam printempo,
Eĉ sennoma monto estas dekorata
Per maldensa nebuleto
[Haru nareya na mo naki yama no usu gasumi]

Sidante en la halo Nigatu-doo,

Ceremonio por ĉerpi akvon,
Bonzoj en frido kvazaŭ glaciejo
Marŝas kun bruo de lignoŝuoj
[Mizutori ya koori no soo no kutu no oto]

Irinte al Kioto, mi vizitis s-ron Mitui Syuuhuu en la monta vilao de Narutaki.

En umearbaro [prunarbaro].

Floroj de umeo estas blankaj,
Sed kie estas gruo, kiel ĉe ĉina ermito?
Ĉu ĝi estas forŝtelita hieraŭ?
[Ume sirosi kinou ya turu wo nusumaresi]

Kverko staras belfigura,

Indiferente

Al umefloroj

[Kasi no ki no hana ni kamawanu sugata kana]

Mi renkontis sanktan Ninkou-syoonin de la templo Saigan-zi en Husimi.

Min sur robon

Aspergu per gutoj

El persikfloroj de Husimi

[Waga kinu ni Husimi no momo no sizuku seyo]

Sur la vojo al la urbo Ootu tra monta pado,

Veninte laŭ monta pado,

Mi trovis violojn

Elegantaj nedireblaj

[Yamazi kite nani yara yukasi sumire gusa]

Panoramo de lago Biwa

Pinoarbo de Karasaki

Tra nebuleta vualo videblas

Pli svage ol ĉerizfloroj

[Karasaki no matu wa hana yori oboro nite]

{Sidante en gastejo dum tagmeza ripozo.

Malantaŭ floroj

De rododendro en vazo,

Gadon ŝiras virino

[Tutuzi ikete sono kage ni hidara saku onna]

Poezia irado.

Sur kolzflora kampo
Paseroj havas mienon
Kvazaŭ spektas florojn
[Nabatake ni hanami gao naru suzume kana] }

En la urbo Minakuti mi renkontis malnovan amikon post 20 jaroj.

Ni revidis nin duope vivaj,
Ho, ĉerizfloroj samtempaj,
Ili ankaŭ vivas inter du animoj
[Inoti hutatu no naka ni iki taru sakura kana]

Unu bonzo el Hirugakozima de la provinco Izu, vaganta ekde lastjara aŭtuno, aŭdinte mian nomon, venis post min ĝis la provinco Owari por akompani min en vojaĝo, do mi versis.

Nu, kune manĝu
Spikiĝintan hordeon sur kampo,
Ni – vagabondoj
[Iza tomoni homugi kurawan kusamakura]

Li informis min, ke ĉi-jare en la komenco de unua monato, [sub bonodoro de umefloroj,] mortis sankta Daiten de la templo Engaku-zi. Mi, vere, sentis min aŭdanta pri tio kvazaŭ en sonĝo kaj el la vojo mi sendis al s-ro Kikaku vortojn.

Sopirante je la umefloro,
Mi klinas kapon antaŭ deŭzio,
Kun larmoj
[Ume koite unohana ogamu namida kana]

Al s-ro Tokoku,

Al blanka papavo,
Papilio detiris sian flugilon,

Kiel postlasita memoraĵon.

[Siragesi ni hane mogu tyou no katami kana]

Denove ĉe s-ro Touyousi mi restas, kaj, ekirante nun al oriento Edo, mi versis.

El profundo de peonia gineceo

Eliranta abelo,

Bedaŭras adiaŭon

[Botan sibe hukaku wake izuru hati no nagori kana]

Survoje mi iris en monton en la provinco Kai.

Al iranta ĉevalo

Estas donata tritiko,

Konsolo en loĝejo.

[Yuku koma no mugi ni nagusamu yadori kana]

En la fino de kvara monato mi revenis hejmen al la ermitejo, kaj, mallacigante min, konsumitan de vojaĝo, versis jen.

Somera robo,

Ankoraŭ pedikojn

Mi ne deprenis.

[Natu goromo imada sirami wo tori tukusazu]